N-o 6. **BULTENO** 1936. 9. XII.

**DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefono n-ro 718-41.*

*Redaktas : ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## Internacia Esperanto - Ligo.

Niaj anoj relegu la ĉefartikolon de nia lasta numero. Depost ĝi okazis gravaj ŝanĝoj. La delegitoj de UEA balotis per granda plimulto por propono de estraro translokiĝi sidejon de UEA Londonon. Sed kelkaj svisaj UEA-anoj trovis, ke la aranĝo de la balotado ne respondas al formalaj paragrafoj de la UEA-statuto kaj malpermesis per agoj de svisa tribunalo translokiĝigon de UEA-oficejo Londonon. Prezidanto Bastien provis interkonsenti kun tiuj anoj. Sed dum la Viena kongreso venis de ilia reprezentanto Paul Bouvier letero rifuzanta interkonsenton tute decide. Tiam la komitatanoj en Wien akceptis la proponon, kiun havis direktoro Goldsmith preparitan jam en la poŝo, eksiĝi el UEA kaj fondi novan asocion, Internacian Esperanto-Ligon, kun sidejo en London.

IEL prenos la ambaŭ taskojn, kiujn ĝis nun plenumadis UEA. Eldonos jarlibron, monatan revuon „Esperanto-Internacia" kaj krome havos kiel oficialan organon la „Heroldon de Esperanto", redaktatan de Jung kaj eldonatan de li en Nederlando.

Sed la UEA ne volas likvidi. Estis en Genève kreita provizora komitato, kiu proklamas sian intencon daŭrigi la funkciadon de UEA. La situacio de organizo internacia do ne estas brila. Ekzistas du organizoj, ambaŭ pretendantaj esti unusola. Kulpaj estas ĉefaj gvidantoj de IEL, kiuj pro kaŭzoj al mi ne konataj ne volis revoki siajn kulpigojn pri estintaj ĉefaj gvidantoj de UEA, precipe pri sperta direktoro Jakob kaj tre talentita kaj laborema verkisto kaj ĵurnalisto Privat. Ekz. kiam mi proponis dum kunsidoj de la komitato en Wien, ke la komitato petu Privat, ke li akceptu kandidatecon en la nunan komitaton, por ke ni povu tiamaniere manifesti restarigitan solidarecon de ĉiuj gvidaj personoj, prezidanto Bastien rifuzis eĉ paroli pri tia propono. Kaj kiam mi prezentis al la laborkunsido de la kongreso rezolucion de Bleier, ke la kongreso proklamu sian konvinkon pri honesteco de eksdirektoro Jakob kaj eksiĝintaj komitatanoj, s-o Petit, sekretario de la Franca societo p. p. E, malebligis diskuton pri tiu rezolucio per minaco, ke li faros atakajn proklamojn.

La legantoj komprenu el tiuj detaloj, ke mi persone ne sentas la renverson faritan per Vienaj decidoj kiel respondantan al miaj konvinko kaj plaĉo. Sed mi estas konvinkita kiel ĉiam, ke centra internacia organizo estas nepre bezona. UEA en Genève tre versimile dum nuna tempo sole vegetos. Tial mi en interkonsento kun ceteraj EAĈSR-komitatanoj rekomendas al niaj anoj, ke ili aliĝadu grandnombre al IEL kiel aktivaj membroj. La kategorioj de membroj estas la samaj kiel estis tiuj de UEA, ankaŭ la kotizoj en Kč estas la samaj.

Unu novaranĝo estas tre simpatia. **Membro subtenanto** povas por la neplialtigita kotizo (160 Kč por jaro) ricevi kiel premion tutjaran abonon de Heroldo de Esperanto. Ni tre rekomendas uzon de tiu ĉi aranĝo.

Nia asocio jam anoncis al IEL, ke ĝi aligas sian membraron kiel pasivajn anojn sub unusola kondiĉo, ke novaranĝo internacia ebligos ankaŭ en nia lando organizan ordon.

Ni anoncis nin ankaŭ pretaj laŭ bone elprovita maniero enkasigi kotizojn de aktivaj membroj de IEL.

Ni invitas do ĉiujn niajn anojn aliĝi laŭ ebleco rapide al IEL kaj sendi la kotizojn per niaj poŝtpagiloj.

La jarlibro de IEL aperos jam en marto.

*Dr. Stan. Kamaryt.*

---

**Là fame konata oratoro kaj verkisto**

**JOSEPH R. SCHERER**

venos Ĉeĥoslovakion en januaro 1937 por fari prelegojn kun lumbildoj pri diversaj temoj. Jam anoncis sin preskaŭ dudeko de lokoj. Prelego de Scherer signifas gravan faron propagandan. Oni povas efektivigi ĝin sen granda risko kaj sen troa peno. Precipe samideanoj el lokoj, kie ankoraŭ Scherer ne prelegis publike, anoncu sin!

Petu la kondiĉojn kaj konsilojn de nia kasisto **J. Friedrich,** fervoja konsilisto en **Košice,** Jarná 13!

## *Kroniko esp-ista en ČSR.*

**Granda intereso pri Scherer-prelegoj.** Tuj post la unua alvoko invitis s-on Scherer 19 urboj en nia respubliko, tial lia restado en nia lando daŭros de la 6. I. ĝis la 12. II. Preskaŭ en ĉiu el tiuj ĉi urboj li havos ankaŭ porlernejajn prelegojn. Ni atendas, ke paroladoj de Scherer en nia lando havos grandan sukceson laŭ morala, sed ankaŭ laŭ financa vidpunkto. Esperantistoj, kiuj ankoraŭ dezirus aranĝi liajn prelegojn, turnu sin tuj por informoj al la kasisto de EAĈSR J. Friedrich, Košice, Jarná 13.

**Ĉeĥoslovakaj ĝendarmoj kaj esperanto.** La ministerio de internaj aferoj eldonis 17-an de aŭgusto 1936 sub n-ro 58.427/1936/13 gravan dekreton, per kiu ĝi permesas al ĉeĥoslovakaj ĝendarmoj membrecon en esperantistaj societoj, organizitaj en EAĈSR. Per tiu dekreto akiras niaj ĝendarmoj eblecon organizi sin ĉu senpere ĉe EAĈSR, ĉu en niaj lokaj grupoj aŭ per EAĈSR ankaŭ internacie. La dekreto aperis ankaŭ en la oficiala Bulteno de la ministerio.

**Esperanto kaj ĉeĥoslovaka poŝto.** Pri la specialaj kursoj poŝtistaj en la Cseh-Instituto, Arnhem, publikigis nia ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj la 20-an de junio 1936 dekreton n-ro 39.489/III-1936, en kiu ĝi donas detalajn informojn pri la kurso kaj petas de ĉiuj oficejestroj tujan diskonigon. En la dekreto koncedas la ministerio eksterordinaran libertempon unusemajnan por la partoprenantoj. La unuopaj poŝtaj direkcioj represis tiun dekreton komplete. Ni vidis tiun represon, preskaŭ du paĝojn okupantan, en la Bulteno de la poŝta direkcio en Praha. Pri la pasintjaraj poŝtistaj Cseh-kursoj okazis samaj aranĝoj laŭ la ministeria dekreto nro 23.444/III-35 de la 14-a de junio 1935.

**Bibliotekoj de Esperanto-grupoj en Ĉeĥoslovakio.** Sur p. 53 de la jarkolekto 1935 ni donis liston de esperanto-bibliotekoj en nia lando. Ni kompletigas ĝin per informoj, kiujn ni ricevis post publikigo de la nomaro. Laŭ ĝi posedas bibliotekojn ankoraŭ jenaj grupoj: Brno (E. K.) 260 volumojn, Jaroměř 70 volumojn, Kolín 60 volumojn, Plzeň (Laborista Ligo) 110 volumojn. La nomaro ne estas ankoraŭ finita. Ni tre konsilas al ĉiuj grupoj, ke ili dediĉu la plej bonan zorgon por posedi indan kolekton de libroj.

**Konkurso por legintoj de la Ĉeĥoslovaka Antologio.** Ni dediĉis du premiojn po 100 Kč por tiuj, kiuj balotos pri la plej bona peco en la libro. La juĝantaro estas s-oj Fr. Slavík, Jozef Friedrich, Julie Šupichová. La termino estis 31an de oktobro 1936. Kiel konfirmon ricevis partoprenantoj de la konkurso unu gvidfolion el nia lando. La konkurso estis publikigita en Lingvo-Libro 1936, n-ro 2, p. 17. La rezulto aperos en nia venonta numero kaj en Lingvo-Libro.

**Novaj gvidlibroj esperant-lingvaj.** Klubo de ĉs. turistoj aperigis 14 paĝan gvidfolion tre luksan pri G r o t o j d e l a K l u b o d e ĉ e ĥ o s l o v a k a j t u r i s t o j D o m i c a, J a s o v k a j B i e l s k a. La bildoj same eminentas kiel la traduklingvaĵo. — La societo de okcident-bohemiaj banlokoj aperigis 14 paĝan gvidfolion „M o n d f a m a K u r a c b a n l o k o K a r l s b a d, Ĉ e ĥ o s l o v a k u j o" kaj 16-paĝan propagandan broŝuron F r a n t i š k o v y L á z n ě — F r a n z e n s b a d. Ambaŭ estas tre plaĉaj eldonaĵoj kaj en tre bona esperanto. Ili estis disdonataj inter kongresa dokumentaro en Wien. Ĝi signifis efektive grandskalan propagandon kaj la societo de la banlokoj akceptu nian gratulon.

**Ligo de katolikaj esperantistoj** en Ĉeĥoslovakujo havis ĝeneralan kunvenon en Praha (II., Ostrovní 18) la 2-an de aprilo 1936. Estis elektitaj: Honora prez. Dr. A. Eltschkner, episkopo, prezidantino Lud. Dandová, I-a vicprez. Fr. Zelenka, II-a vicprez. kaj sekretario Fr. Buhr, kasisto Fr. Kozel, komitatanoj L. Penzová, Fr. Kudrna, P. Dr. Jul. Hewera, A. Krolopová, K. Trnka. Vickomitatanoj Aleš Berka, R. Štálová, Al. Macek, Jos. Kania. „Informilo" de Ligo aperadis dum 1936 en Brno kaj estis dediĉita al propagando de la XVIII. kongreso katolika kaj redaktata de A. Berka. Aperis ĝis nun 3 numeroj.

**La 18a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj,** okazinta la 4.—9. VIII. en Brno, vere komencis jam la unuan de aŭg. per malfermo de granda e-ekspozicio. Ne nur ĝi, sed ĉiuj aliaj aranĝoj estis bone organizitaj kaj niaj katolikaj kunlaborantoj povas fieri pri sukceso de sia laboro. Aliĝis 250 p., venis 200 el 15 landoj. Protektoroj estis la urbestraro kaj Dro L. Prečan, ĉefepiskopo de Olomouc, Dro J. Kupka, episkopo de Brno, honora prezidanto Dro Ant. Eltschkner, helpepiskopo de Praha. Kardinalo Innitzer, Aŭstrio, sendis salutleteron je la komenco, kardinalo Dro Kašpar, Praha, je la fino de la kongreso. — La programo estis bone preparita. La temoj de la laboroj estis: Amo al Patrujo, e. en la servo al katolik-

ismo, Eldono de Biblio en e. por katolikoj. Krom ĉiutaga diservo aŭ meso kaj predikoj en e. okazis 3 labor-, malferma kaj ferma kunsidoj, interkonatiĝa kunveno, ekskursoj al Moravia Karsto, ĝiaj grotoj kaj kavernoj, al Vranov (tie laborkunsido) kaj Bítov, komuna tagmanĝo, fotografado, pilgrimo al Velehrad ktp. Centra punkto de la kongreso ŝajnis esti la kunlaboro de ĉina misiisto, Dro J. B. Kao, juna simpatia s-ano, kiu jam antaŭ kaj ankaŭ post la kongreso faris tre utilan propagandon ne nur en la kongresurbo, sed ankaŭ en Praha, en Radiojournal Brno, en Uherské Hradiště ktp. La kongreso havis bonan eĥon en la gazetaro. Ni trovis 127 artikolojn en 62 gazetoj! Tre grava faro propaganda estis ankaŭ E-ekspozicio. Ĝi enhavis ampleksan materialon plaĉe instalitan precipe el esperantaĵoj pruntitaj el ekspozicia materialo de nia asocio. Krome ĝi enhavis kolektojn de ceremoniaj paramentoj, kiuj estis donacitaj al ĉinaj misioj kaj ekspoziciataj antaŭ la forsendo. Al ekspozicio estis invitata publiko per apartaj afiŝoj. Ankaŭ pri la kongreso estis la publiko atentigata per multaj afiŝoj ĉeĥa-esperantaj. Meritas dankon pro la bona aranĝo kaj sindediĉo al la afero precipe Aleš Berka kaj nia komitatano Vondroušek.

**Esperantista rendevuo en Hradec Král.** 28. VI. 1936 plenumis, kion ĝi promesis kaj kion atendis la partoprenantoj. Evidentiĝis, ke ne malaperis la tradicio de la laborkunsidoj orientbohemaj kaj venis al Hradec Králové bela aro de homoj kun serioza intereso por la movado. Delegito de EAĈSR s-ro Ginz priskribis la situacion enlandan kaj internacian, informis pri la preparoj de la Asocio por la venonta laborsezono kaj tiam sekvis vigla debato partoprenata de proksimume 30 ĉeestantoj el 19 lokoj. Kvankam ne mankis bona humoro, tamen daŭris interparolo pri laboroj ankaŭ dum la komuna manĝo kaj dum ĉiuj promenoj tra la bela urbo. Komune estis vizitita la bone aranĝita esperanta stando en la Ekspozicia Foiro. Ĉiuj konsentis ne okazigi la planatan ekskurson al Kunětická Hora kaj daŭrigi la pritrakton de la multaj temoj prezentataj. Ĉiuj ĉeestintoj estis certe tre kontentaj kaj foriris refortigitaj al sia laboro.

**Krucenigmo.** Ni ebligis publikigon de krucenigmo kun vortoj rilatantaj esperantomovadon en la gazeto por enigmoj Křížovka-Důvtip (numero 23., 1936.) La enigmo estis kompilita de V. Šavel. Ni promesis al solvintoj premiojn. La rezulto estis neatendite bona. Venis solvoj de ĉ. unu mil homoj. Laŭ nia promeso ni sendis al ili 10 Šilhalernolibrojn, 100 broŝurojn Svaz národů o esperantu, 200 ĉeĥajn ŝlosilojn, kaj al ĉiu solvinto Jeden jazyk kaj Všem přátelům. Tiamaniere atingis nia varba kaj informa materialo mediojn de publiko, kiujn ni malfacile estus trafintaj alimaniere.

---

## Henrik kaj Erika Seppik en Ĉeĥoslovakio.

Montriĝis, ke EAĈSR agis ĝuste, invitinte la estonan Ĉe-instruiston s-ron Seppik al nia lando. Post lia bonega laboro dum la pasinta sezono ni estis feliĉaj povinte disponi pri liaj kapabloj post paso de la somero. Nunan fojon venis ankaŭ lia talenta edzino sinjorino Erika kaj ŝi kun mirinda ĉarmo, sed kun energio nevirina, instruas esperanton al ĉeĥoslovakoj, ĝoje ŝin aŭskultantaj.

Lastatempaj informoj: En Brno gvidas s-ro Seppik du publikajn kursojn kun 70 p., du kursojn en Radiojournal kun 33 p. S-ro Vondroušek lertege zorgis pri diskonigo. Surstrate 200 grandaj afiŝoj, afiŝoj ankaŭ en ĉiuj oficejoj kaj lernejoj, 4000 flugfolioj, 30 gazetaj anoncoj. Provlecionon partoprenis pli ol 300 homoj. La halo ne sufiĉis por la venintoj kaj multaj devis foriri.

S-ino Seppik: 3. XI. Uh. Hradiště parolado kaj provleciono — 200 aŭskultantoj; 4. XI. Uh. Hradiště parolado kaj provleciono en kom. akademio — 75 aŭskultantoj; 4. XI. Napajedla parolado kaj provleciono en monakinejo — 100 aŭskultantoj; 5. XI. Uher. Hradiště provleciono en burĝa lernejo — 360 aŭskultantoj; 6. XI. Uh. Hradiště provleciono en knabina burĝa lernejo — 350 aŭskultantoj; 8. XI. Otrokovice parolado kaj provleciono — 300 aŭskultantoj; 10. XI. Kunovice provleciono en burĝa lernejo — 260 aŭskultantoj. Dum unu semajno aŭskultis en tiu regiono pli ol 1600 p. pri esperanto. S-ino S. instruas 100 lernantojn en Uh. Hradiště, Otrokovice kaj Napajedla.

Kiu ne estas kontenta pri rezulto de siaj klopodoj, kiu kredas, ke lia laboro ne alportas la merititan sukceson sufiĉe rapide, kiu ŝatas pli rapidan marŝon de nia afero, invitu tuj al sia loko sinjoron aŭ sinjorinon Seppik. Ilia laboro estos freŝa vento en viajn velojn!

Ni atentigas, ke la gesinjoroj estas jam nun liberaj dum ĉiuj sabatoj kaj dimanĉoj por aranĝo de paroladoj.

**Lektoro H. Seppik en Bratislava.** La sukcesa Cseh-metoda instruisto venis Bratislavan el Estonujo la 9-an de septembro. La 10-an kaj la 11-an estis en halo de Komercista ĝremio prelegoj pri Laplando kaj provlecioj. En la unua estis traduko slovaka (Pavel Rosa), en la dua traduko ĝermana (Herold Kesík). Solena malfermo de la kurso estis la 15-an en prelega halo urba. Kurso okazis dufoje dum la semajno po duhoraj lecionoj en urba legejo. La 6-an de oktobro estis publika prelego „Estonio, lando kaj popolo". La 7. X. estis inaŭgurita rapidkurso 3 foje semajne po du horoj en reallernejo. La 30-an de oktobro estis kursfina festo en restoracio Nosek. Kursanoj estis sume 53. La prelegojn vizitis sume 400 homoj. Kiel tradukanto kaj intrepretisto funkciis Pavel Rosa. La prelegoj estis aranĝitaj de Osvetový sväz kaj de E. Klubo. La 22-an de oktobro estis prelego pri Estonio en Nové Zámky (300 p.) kaj 30-an en Parkán (s-ino Seppik, 200 p.) La klubo aranĝis tuj post fino de la Seppika kurso senpagan kurson por progresintoj gvidatan de P. Rosa, kiun partoprenas preskaŭ ĉiuj kursanoj de Seppik. La ĉefa rezulto de la agado de Seppik en Bratislava estas en tio, ke per reklamo por la kurso oni sukcesis atingi mediojn, kiujn ni ne atingas per nia kutima propagando. El kursanoj fariĝos tre versimile aktivaj anoj de la loka klubo kaj per tio de la asocio. Ankaŭ propagando farita per gazetoj kaj per intervuoj de Seppik meritas mencion. Precipe efikaj estis tri artikoloj de Seppik pri Estonio kaj Svedlando tradukitaj el esperanta manuskripto de P. Rosa, kiuj aperis en tre ŝatata revuo Zem. — La 1-an de novembro foriris Seppik en Brnon, kaj lia edzino en Uherské Hradiště, kie ili jam laboras kun kutima sukceso. — Ni tre rekomendas, ke ankoraŭ pluraj lokoj invitu Cseh-metodan instruiston. Turnu vin tuj al nia kasisto J. Friedrich en Košice, Jarná 13.

---

## Esperantista Klubo Praha.

Ne facilas raporti sur limigita spaco pri nia ampleksa konstanta laboro. Pri ĝi ni devas diri, ke iam ĝi estas ankaŭ peniga. La pretendoj al reprezenta grandurba societo estas altaj, kio kreas cirkonstancojn pli severajn ol aliloke, kaj ne ĉiam sufiĉas rimedoj kaj fortoj. La multajn taskojn klopodas solvi estraro, elektita la 21. II. 1936 de ĝenerala jarkunveno kaj konstituanta jene: prez. s-o J. Šustr, vicprez. s-o Janda, sekr. s-o Šinták, kas. s-o R. Hromada, 1a bibl. s-o M. Staněk, 2a bibl. s-o Čermák, arkivo: s-o Lešák, revuoj: f-ino Vavrušová, prot. s-o Požárek; vickomitatanoj: f-inoj Konopová kaj Tarantíková, s-oj Dlabač kaj K. Khel; revizoroj: s-inoj Bárochová kaj Staňková, s-o Košler.

Regulaj kunvenoj okazas ĉiuvendrede post la 20a en aparta ejo de „Louvre", Praha II., Národní 20a. La ĉeestantaro tre varias laŭ nombro: iam la salonego ne sufiĉas, iam nur 20—30 p. kolektiĝas. El la programo prezentata ni citu: 28. II. parolis s-o J. Šustr pri japanaj lingvo kaj skribo, montrante kelkajn ideogramojn, kaj s-o H. Haefker, la konata verkisto de „Jarmiloj pasas", pri varbado por kaj per e. — 6. III. okazis prelego de s-o Haefker pri la „Historio de venontaj 100 jaroj", 13. III. vigla debato je la temo „Kiel mi aranĝus UK en Praha". Interdiskutis ges-oj Bárochová, Ginz, Hromada, Klopfleisch, Požárek, Šustr, Vavrušová k. a. — 20. III. legis s-o V. Andršt interesan, de li tradukitan artikolon pri e. aperintan en „Nedělní list" la 15. III., kaj ĉefserĝento s-o Lettl sian tradukon „Ekstermo de aŭtomobiloj en ĈSR." — 27. III. s-o Požárek prezentis kaj klarigis interesan diagramon pri la vizito en la klubo dum 1935. — 3. IV. Sveda Vespero. La programo konsistis el prelegoj pri Svedujo, ĝia e-movado, literaturo k. s. — 17. IV. prelegis kun lumbildoj s-o Haefker pri „Printempa kolospentraĵo surĉiela — mitoj kaj legendoj el la printempa stelbilda fabelaro". — 8. V. Rumana Vespero (okaze de la rumana ŝtatfesto la 10. V.). Prelegoj pri Rumanujo, ĝia historio, literaturo en e-traduko, popolkantoj, naciaj kostumoj, lumbildoj. Al tiu ĉi aranĝo EK invitis la rumanan ambasadorejon, kiu, bedaŭrinde — ne povis partopreni, aranĝinte samvespere oficialan solenon, sed sendis gratulleteron. Krome venis salut- kaj dankletero de Rumana E-Societo kun promeso reciproke aranĝi Ĉs. Vesperon, kaj iom malfrue simpatia letero de la rumana ministerio por eksterlando, kio precipe ĝojigis la s-anojn, antaŭ ĉio la ĉef-organizinton de la Vespero s-on Požárek, konatan rumanamikon, kaj lian helpinton en la aranĝo, s-on leŭtenanton Goranescu en Focsani, Rumanujo. La letero, kiu alte taksas la valoron de tiu ĉi aranĝo „stimulanta alproksimiĝon de la du amikaj nacioj . . .", estas subskribita de la ministro kaj direktoro de la ministerio. — 15. V. parolado de s-o R. Čermák: Esperanto — Lingvo? Ideo? La parolinto estas unu el la

novaj adeptoj nur el la kurso ĵus gvidata de s-o Hromada. La temo bone ellaborita kaj elokvente interpretita rezultigis viglan debaton, interrompitan poste per alveno de grupo de 12 nederlandanoj kaj 1 norvego, fervojistoj vizitintaj nian landon. — 22. V. diversaj aktualaj informoj, ekz. de s-ino A. Barochová pri venota e-radioprogramo de Verda Stacio Brno, de s-o Hoche pri la programvesperoj de „Verda Stelo“ k. a. (Cetere informojn pri aktualaĵoj prezentas la prez. s-o J. Šustr en ĉiu kunveno.) — 29. V. s-ino J. Weleminsky laŭ invito de la klubestro parolis je la temo „Kial la folioj estas verdaj“. Tiu ĉi spirita ekskurso en botanikan sferon estis por ĉiu io nova. — 5. VI. la prez. atentigas pri la e-ista renkontiĝo en Hradec Králové (vidu sub Lokaj informoj), prezentas programon por tiu kunveno kaj helpate de s-o O. Ginz, vicprez. de EAĈSR, insiste varbas por grandara partopreno. La saman vesperon kompletigas s-o Požárek per rakonto de legendo pri rumana monaĥejo „Putna“ kaj s-o Šustr pri kurioza e-gazeto, aperadinta sur la Hinda Oceano, Ruĝa Maro kaj Mediteraneo; li montras la kompletan kolekton kaj flamigas vervan intereson ĉe la novuloj. — 12. VI. prelegis s-o Haefker pri „Gilgameŝ, antikva, 4000jara eposo babilona“. Li klarigas la enhavon de samtitola verko kaj legas kelkajn plej interesajn fragmentojn.

Somere okupis nin akceptado de fremdlandaj s-anoj, da kiuj pli ol 100 el 9 landoj vizitis la klubon, ekz.: Dro J. B. Kao, ĉina katolika pastro, kiu 31. VII. parolis pri sia lando; 3. VIII. sveda, 7. VIII. estona kongreskaravanoj, kiuj restis po du aŭ tri tagoj rigardinte la urbon kaj ĉeestinte la klubvesperojn; 20. VIII. EK partoprenis meson legitan de itala kat. pastro, s-o Carolfi ĉe la altaro de Jezueto de Praha; 4. IX. raportadon pri UK—Vieno partoprenis s-o Kioŝi Igekawa, japano; 13. IX. EK kun EAĈSR organizis e-istan laborkunvenon de kunlaborantoj el Praha, kiun ĉeestis s-ino Strejčková kaj s-o J. Šamla el Brno, kaj s-o Haefker, germanuja s-ano; krome gastis ĉe ni s-anoj el Anglujo, Danlando, Luzacio kaj Usono.

2. X. prelegis pri Katalunujo, kun montro de kataluna poezio f-ino Boháčová.

Kursojn, komenculan kaj perfektigan, EK organizas dufoje en la jaro, printempe kaj aŭtune. Ilin majstre gvidas s-o R. Hromada, helpata iam de s-oj Požárek aŭ Šinták. La anoj de la perfektiga kurso kutime partoprenas la klubkunvenojn.

La klubon gvidas la prez. s-o J. Šustr jam dum pluraj jaroj, senlace kaj fidele. Dankindaj estas lia merito pri la harmonia, vigla laboro de la komitato kaj ĉiuj klubanoj. Of.

---

## *Ni esperantigu la skoltojn!*

*Por fine atingi konsiderindan sukceson por Esperanto en iu ajn fako ni devas radikale ekagi. Lastatempe oni aŭdas multon pri la aktualeco de propagando inter la skoltoj. Sekvontan someron okazos en Nederlando jamboreo, kiun partoprenos multmiloj da geskoltoj el kvindeko de landoj.*

*Laŭ ricevitaj sciigoj niaj aŭstriaj, hungaraj kaj skandinaviaj samideanoj jam forte eklaboris por esperantigi la geskoltojn de sia lando. Sekvu ankaŭ ni ilian ekzemplon. La malmultaj geskoltoj, kiu klopodas esperantigi siajn gefratojn en nia lando, ne povas atingi rapidan, rimarkindan sukceson kaj ni nepre bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo.*

*Karaj gesamideanoj! Promesu al mi, ke ĉiuintre vi ĉiuj, sed senescepte ĉiuj, esperantigos almenaŭ po unu skolto. Certe troviĝos inter viaj gekonatuloj kelkaj skoltoj aŭ skoltinoj. Klarigu al ili la avantaĝojn de esperanto dum internaciaj kunvenoj, kia estos la sekvontjara jamboreo en Vogelenzange (Nederlando). Promesu al ili, ke lernante nian lingvon ili povos korespondadi kun siaj gefratoj tra la tuta mondo. „Skolta Bulteno“ enhavas ĉiam adresojn de korespondemaj geskoltoj, inter kiuj troviĝas multaj filatelistoj, fotografistoj k. s. Preskaŭ ĉiuj ni havas hejme malnovan esp. gramatikon, donacu ĝin al la lernemaj geskoltoj. Vizitu la skoltestron de via urbo kaj persvadu lin, ke li rekomendu al siaj subuloj partopreni esp. kurson. Eble eĉ li mem intencas viziti la jamboreon. Ankaŭ al li utilos tie nia lingvo.*

*Pri via laboro informu fraton St. Lešinger, sekr. de la Esperanto Sekcio de la Porfremda Gvidista Fako de la Ĉeĥoslovaka Skoltasocio, Praha-Nusle 429, c/o Mr. B. Vospálek. — Estas tre grave por plua laboro ĉe la skoltestraro, ke ni sciu pri ĉiu unuopa skolto-samideano. Precizaj statistikaj datoj konvinkos la gvidantaron.*

*Karaj gesamideanoj! Ekagu senescepte kaj senprokraste!*

*Sukceson!* *SEL-ano.*

---

**Nova BES-Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj** (13-a eldono) aperos — pro ankoraŭ nesufiĉa nombro da aliĝintoj — nur vintre 1936-37. — Aliĝoj ĝis 31. XII. — La interesiĝantoj bonvolu pacienciĝi kaj afable informi pri tio ankaŭ la aliajn!

# *Lokaj informoj.*

*Asch.* 18. I. jarkunveno reelektis la malnovan komitaton: prez. s-o Hollerung, sekr. s-o Pfeifer, kas. f-ino Singer. 9. II. ekskurso al la ĉirkaŭaĵo. Regulaj kunvenoj monate.

*Bohumín.* Dopravní úřad ČSD (fervoj-oficejo) aranĝis kurson komence de novembro. Instruas s-o J. Raszka, ŝtate ekzamenita. EK aliĝis al la nove organizita pacmovado kune kun aliaj gravaj societoj lokaj.

*B. Leipa.* 22. I. jarkunveno elektis prez. s-on Kowaržik, vicprez. s-on Schlesinger, sekr. s-on Isba, kas. s-on Hubner. Regulaj kunvenoj la unuan mardon de ĉiu monato en restoracio „Apollo".

*Bratislava.* Regulaj kunvenoj de EK, kiu ĵus festis 25jaran ekziston, okazas ĉiumerkrede en YMCA. Depost 4. XI. perfektiga kurso gvidata de P. Rosa.

*Brno.* — *EK:* 1. IV. gaja Aprila vespero radie disaŭdigata, 150 p. — 12. V. bonvenigo de grupo de nederlandaj s-anoj fervojistoj rigardintaj la urbon kaj ĉirkaŭaĵon. — 2. V. amika kunveno kun parolado de H. Seppik; lumbildoj kaj Ĉe-metoda provleciono. — Amikan vesperon la 6. VI. ĉeestis 70 p., inter ili dir. Neužil kun grupo de 16 gelernantoj partoprenintaj en la varia programo. Cetere aktoris V. Šindler, Vl. Stolejdová kaj Kozdera. — 1. VIII. malfermo de ekspozicio okaze de la Internacia kongreso de katolikaj e-istoj. Vizitis ĝin laŭtakse 400 ĝis 500 p. La partoprenintoj ricevis 33% rabaton sur la ŝtataj fervojoj. — Kunlabore kun Komenského vyšší škola lidová (Popol-universitato Komenský) estas malfermita kurso la 7. X. por 25 komencantoj. Instruas s-o J. Vondroušek. La akiro de kunlaboro de la nomita institucio signifas gravan sukceson. Ĉiuj lokaj gazetoj anoncis la entreprenon. — Dum la Propaganda Semajno anoncis la kurson 100 grandaj afiŝoj (eldono de EAĈSR) kaj 20 bele ekipitaj tabuletoj, pretigitaj de s-o Nečas. Krome okazis pergazeta kaj perradia propagando. — 10. X. Amika vespero en Spegulsalono de hotelo Passage, 50 p. Prezidis kaj parolis Prof. Kilian. El la programo: transdono de kluba surtabla standardo, muziko de violonvirtuozo F. Mašek kaj Dro K. Raušal, deklamado de J. Lázníčková, kantoj de Stolejdová kaj J. Válka. — Por novembro estis preparata Ĉe-kurso de H. Seppik. — Somere okazis du prelegoj de bulgara s-ano Prof. Pamporov. — 3. XI. Ĉe-kursa provleciono de s-o H. Seppik kun nordanaj popolkantoj. 300 p., la salono ne sufiĉis, multaj gastoj ne plu trovis lokon kaj devis foriri. Enkondukajn vortojn en tre konvena maniero diris s-oj D. Chalupa, verkisto, kaj Hoffner. 6. XI. malfermo de Ĉe-kursoj. — Intervjuo de s-o Seppik en 8 redakcioj. — *Katolikoj:* 24. IX. kaj 1. X. malfermo de kursoj komencula kaj perfektiga. — *Germanoj:* 4. XI. parolado kaj provleciono de Ĉe-metoda instruado de H. Seppik. Kurso malfermita en „Kulturhaus". Regulaj kunvenoj ĉiuvendrede post la 8a en restoracio „Kittel", Kobližná.

*Břeclav.* 27.—28. IX. ekspozicio organizita de la loka E-Rondeto en ejo de komerca lernejo. 5. XI. malfermo de Ĉe-kurso de s-o H. Seppik. La loka movado bedaŭras la foriron de tre laborema gvidanto, s-o Stratil, kiu ekpostenis en Bratislava, kaj funebras pro la morto de s-ano P. Karolo Zouhar, e-isto de post 1904, † 17. VI.

*Česká Třebová.* 8. X. laborkunveno de la loka societo de E-amikoj. Propagando kaj kurso preparataj.

*České Budějovice.* 4. IV. ĝenerala jarkunveno elektis jenan laborkomitaton: prez. s-o V. Fiala, vicprez. s-o R. Slivka, sekr. s-o Průcha, kas. s-o K. Hofhansl, bibl. s-o St. Marzinovský. La klubo aligis 9 anojn al EAĈSR.

*Darkov.* Kurson kun 30 komencantoj gvidas s-o Niemiec.

*Dobrovice.* 24. V. oni malfermis novan kurson per parolado de Prof. J. Kožený el Mladá Boleslav kaj propagandan ekspozicion kune kun la loka skoltorganizaĵo. Ĉi-okaze okazis konferenco de e-istoj el la ĉirkaŭa regiono.

*Dolní Bousov.* Loka grupo de EAĈSR aranĝis ekspozicion en la montrofenestroj de la komercejo de s-o Mertlík. Novaj kursoj komencis en oktobro. La loka lerneja komitato decidis unuanime instrui e-on en burĝa lernejo anstataŭ la franca lingvo. La distrikta lernejkomitato akceptis la proponon kaj nun oni atendas la aprobon pere de la landa aŭtoritato. — Komenculan kurson partoprenas 30 p., instruas s-o A. Bobek. Perfektigan kurson kun 10 p. gvidas Dro F. Vaněk. Metodo Kilian kaj Šupichová. — 20. V. Amuz-vespero kun muziko, kantoj, recitado.

*Dolní Marklovice.* 15. IX. malfermo de kurso organizita de REL. 20 komencantojn, ĉeĥojn, germanojn kaj polojn, instruas s-o V. Hrdlička, komunuma sekretario, laŭ Ĉe-metodo. La kurso daŭros 4—5 monatojn.

*Falkenau-Kittlitz.* Kurso por komencantoj — germanaj laboristoj.

*Frýdek.* 1. X. malfermo de kurso organizita de la loka EK.

*Fryštát.* 11. X. labora kaj propaganda kunveno je la temo „Ĉu esperanto estas necesa?", 80 p. Prelegis s-oj Neděla el Lazy, Poncza el Ropice kaj Krysta el Č. Těšín. Pri la etika parto parolis s-ino Bendová el Praha. La pozitiva sinteno de kelkaj lokaj gravuloj faris la rezulton de la kunveno multsignifa. — 15. X. malfermo de kurso organizita de REL. 50 anojn de diversaj nacioj instruas laŭ Ĉe-metodo s-o Em. Sebera, del. de UEA. La kurso estas planata por 5 monatoj.

*Gablonz a. d. Neisse.* 29. I. jarkunveno elektis prezidanton Dron Pontz, vicprezidanton s-on Hub, sekretarion s-on Keil, kas. s-on Mai. — 11. III. Amika

vespero, 18. III. ekskurso al najbaraj s-anoj, 25. III. parolado de Dro Pontz pri juro kaj e., 8. IV. kursfina festo, 15. IV. ekskurso kaj renkontiĝo kun alilokaj s-anoj, 22. IV. ekzercada vespero, 29. IV. piknika vespero ktp. Simila programo ankaŭ en aŭtuno kun laborkunsidoj ĉiumonate. 24. X. malfermo de porkomencula kurso. Regulaj kunvenoj de la loka societo „Izermontaro" ĉiumerkrede je la 20·30 en restoracio „Bastei".

*Grünwald.* Dum nee-ista gimnastikista festo oni prezentis grupan bildon e-an. 26. VII. e-ista renkontiĝo. — Ekspozicio dum Internacia Virin- kaj Infantago.

*Hluk.* Kursfinan feston printempe ĉeestis pli ol 200 p. kaj ĝuis ĝian altkvalitan programon. 20. V. paroladon de s-o H. Seppik pri Laplando aŭskultis pli ol 400 lernej-infanoj kaj instruistoj.

*Hradec Králové.* 16. II. ĉefkunveno de EK. Novelektita laborkomitato: prez. s-o Fr. Šneiberk; ceteraj komitatanoj: s-oj Dro Werner, O. Sklenčka, J. Dolanský, J. Černý, J. Vejnar, F. Pytloun kaj f-ino Hořejší. — 28. VI. e-ista renkontiĝo okaze de regiona ekspozicio, kiu havas e-standon. La programo konsistis el vizito de la ekspozicio, parolado de del. de EAĈSR dum vigla labora kunsido. — 28. IX. ekspozicio en montra fenestro en multtrafika strato. Ĉe-kursoj gvidotaj de s-o H. Seppik estas preparataj. La loka movado sendube profitos pro la reveno de Prof. Miloš Lukáš, kiu ekpostenis ĉi tie. — (En iu gazeto ni legis tre malfavoran kritikon pri la kaduka, malaktuala stato de la propaganda kesteto, lokita sur la urba placo.) — E-Rondeton de teologoj „Stelo Maria" gvidas K. Filip, teologo. Ĝi havas 28 membrojn.

*Hrušová apud Cerekvice nad Loučnou.* Kvinmembra grupeto gvidata de s-o L. Podmele laboris tie ĉi por nia afero. Antaŭ finpreso de tiu ĉi n-ro ni ricevas informon de s-ro Podmele, ke li decidiĝis por la „pli perfekta" occidental. Ni motivite timas, ke la venonta Bulteno povos raporti pri lia transiro al ankoraŭ „pli perfekta" Novial aŭ „maxim perfekta" ido. Ĉiam antaŭen, s-ro.

*Jablonecké Paseky—Bad Schlag.* La GEL-grupo de Jablonec n. N. instalis kaj prizorgas laŭ oficiala permeso de la posedanto de la kuracloko tabulon kun propagandiloj.

*Jägerndorf.* 5. II. jarkunveno elektis prezidanton s-on Kretschmer, vicprez. s-on Schneider, sekr. s-on Heger, kas. s-on Larisch kaj bibl. s-on Korzer. 9. IX. eksterorda ĉefkunveno elektis prez. s-on Seibert, cetere la antaŭan komitaton.

*Jaroměř.* Loka grupo de EAĈSR jarkunvenis la 16. IV. Okazis parolado de s-o Fr. Pytloun el Hradec Králové. Novelektita laborkomitato: prez. Dro Ad. Konečný, vicprez. s-ino Fr. Hofmannová, sekr. s-o Fr. Páv, kas. s-o A. Sedlák, bibl. s-o Holeček. Planata estis regiona kunveno aŭtune. Regulaj kunvenoj okazas alterne: la unuan kaj trian ĵaŭdon de monato en Jaroměř, hotelo Blua Stelo, la duan kaj kvaran merkredon en Josefov, restoracio Hrabánek.

*Jičín.* 16. VIII. vizitis la urbon 8 svedaj anoj, kio multe helpis la propagandan laboron en tiu ĉi loko. La movado tie sendube profitos el la ĉeesto de s-o P. Jan Filip, kiu ekfunkciis tie ĉi kiel nov-konsekrita pastro. — 22. X. E-Rondeto malfermis kurson por komencantoj.

*Jihlava.* 8. X. malfermo de kurso por komencantoj en la junulara organizaĝo de metodista eklezio. 15 p. instruas laŭ konversacia metodo s-o Fr. Páral.

*Komotau.* 5. VII. ekspozicieto okaze de gimnastista festo de ATUS, korpeduka societo.

*Košice.* 18. III. organizis EK kun la urba kleriga institucio paroladon de H. Seppik pri Laplando. 20. III. amuz-kunveno en kafejo „Rohlena", en kiu oni montris rezultojn de la Ĉe-kursoj gviditaj de H. Seppik. 20. VI. jarkunveno de EK, 54 p. Pro la Ĉe-kursoj la membraro kreskis je 50%. Novelektita laborkomitato: prez. s-o J. Friedrich, vicprez. Dro Ján Fíla, sekr. s-o Št. Szeemann, bibl. s-o L. Lemák, protok. f-ino J. Péterffy. Ankaŭ la nunan jaron subvenciis la urbo la lokan movadon per Kč 150. — 20. VIII. kunveno kun Dro J. B. Kao, ĉina samideano. 5. X. parolado pri la kongreso en Vieno, de s-o Králik. Regulaj kunvenoj ĉiulunde vespere en Industria Lernejo.

*Kratzau.* 27. II. jarkunveno de la loka grupo „Verda Stelo" elektis prez. Dron K. Alexowsky, vicprez. s-on R. Scholze, sekr. s-on A. Karl kaj kas. s-on G. Maruschka.

*Kukleny.* Ekspozicio en montrofenestro de komercejo Maier, aranĝita de s-o F. Pytloun, estas multe atentata de la publiko.

*Kutná Hora.* 2. X. malfermo de kurso por komencantoj gvidata de s-o em. dir. Alois Horáček.

*Lázně Bělohrad.* La 3a ĝenerala jarkunveno de la loka grupo la 28. II. reelektis s-on Beran klubestro. La klubo havas 47 anojn. Oni decidis nomi honoraj membroj jenajn elektitojn: Dron A. Eltschkner, helpepiskopon de Praha, generalon J. Rambousek el Č. Budějovice kaj ĝendarman ĉefserĝenton K. Blumauer el L. Bělohrad. En junio okazis e-ista renkontiĝo kun s-anoj el kelkaj aliaj lokoj. La Internacia Libertempejo daŭre funkcianta eldonis novan gvidlibron en e. Konversaciaj kursoj okazas ĉiumerkrede en Hotelo Bohumilka (ĉe la komenco de Aleo de Dro Zamenhof).

*Lázně Štramberk.* 19. VII. venis tien ĉi ekskurso de la laborkunveno de REL.

*Levice.* 29. IX. malfermo de kurso.

*Leitmeritz.* Porkomencula kurso printempe. Regulaj kunvenoj daŭre ĉiulunde en restoracio „Rumburg", je la 20a.

*Lubná apud Litomyšl.* 5. IV. jarkunveno de E-rondeto, 15 p. Novelektitaj: prez. s-o J. Buben, ce-

tere s-oj V. Jílek, J. Kopecký, J. Večeře. Dum Propaganda Semajno ekspozicio en komerca montrofenestro. 8. XI. malfermo de kurso. Konversaciaj rondetoj ĉiudimanĉe en ejo ĉe s-ano J. Večeře. En publikaj ejoj pendas novaj afiŝoj de EAĈSR. La E-rondeto nun havas 15 membrojn.

*Melč nad Opavou.* La 30-membra lerneja klubo organizis e-ekspozicion, pri kiu ni legis en multaj ĵurnaloj. Oni planis por la somero interŝanĝon de nederlandaj kaj belgaj infanoj kontraŭ ĉeĥaj, ĉu tio sukcesis?

*Michalovce.* Parolado de studento Št. Šimkanín en lernejo pri „Evoluo kaj signifo de e".

*Milevsko.* Pentekoste vizitis la regionon bulgara s-ano, Ing. N. D. Tonev. Ĉi-okaze bona propagando kaj prelego pri Bulgarujo kun lumbildoj.

*Mladá Boleslav.* Vigla societa vivo eĉ dumsomere, ban-ekskursoj k. s. 21. X. provleciono kaj malfermo de kurso gvidata de s-o K. Šolc, ŝtate ekzamenita.

*Mnichovo Hradiště.* Konversaciaj kunvenoj de „Verda Stelo" ĉiuĵaŭde je la 20a en domo de s-o Pavlík. Propagandaj notoj en Pojizerské Listy. 14. X. kurso por komencantoj.

*Moravská Ostrava.* 1. IV. porlerneja propaganda ekspozicio en Industria Lernejo kun multa enhavo. Ĝin sekvis malfermo de kurso 4. IV., kiun gvidis Prof. Ing. L. Krajc, 30 p.-lernejanoj. 28. IV. parolado de Prof. Ing. L. Krajc pri e-a literaturo. — 18. V. parolado de s-o H. Seppik pri Svedujo, kun lumbildoj. — 23. VI. laborkunsido en hotelo Brioni. — Vigla societa vivo, ekskursoj, renkontiĝoj eĉ somere. — 22. IX. Parolado de Prof. Ing. L. Krajc pri la UK en Vieno. — 30. IX. malfermo de kurso por komencantoj en Vítkovice, organizita de Lidová škola (popol-universitato). Instruas s-o Vl. Slaný.

*Nové Zámky.* 2. X. malfermo de kurso por komencantoj organizita de la fervoja oficejo. 30 slovakojn instruas laŭ metodo Kilian s-o R. Kocsis, supera fervoj-oficisto. — 22. X. paroladon de s-o H. Seppik pri „Estonujo, lando kaj popolo" aranĝis Ĉslov. Osvetová Jednota (Ĉs. Kleriga Unuiĝo).

*Nový Bohumín.* En aprilo REL-kunveno, aŭtune ekspozicio en montra fenestro de librovendejo Vaŝica.

*Nymburk.* 21. X. malfermo de kurso por komencantoj en „Národní dům".

*Olomouc.* 8. IV. malfermo de Ĉe-kurso de s-o H. Seppik. La loka movado funebras pro la morto de s-ano František Hochmann, e-isto de post 1908, † 19. IX. 5. X. kunveno de e-ista junularo en la urba legejo.

*Pardubice.* La jarkunveno de EK „Doktoro Schulhof" la 3. VI. elektis jenan laborkomitaton: prez. s-o A. Jandík, vicprez. s-ino R. Veverková, sekr-oj s-ino Michalová kaj s-ro D. Ouzký, kas. f-ino M. Vondrová, bibl. E. Kratochvílová. Novaliĝis anoj el la lasta kurso. Okaze de motorbiciklista konkurso, la 14. VI. parolado de unu el la partoprenintoj, sveda s-ano Winberg pri naĝado kaj vivsavado. La venkinto de la konkurso, svedo Lundquist uzis la helpon de la klubo kaj s-o Winberg por interkomprenigi, ĉar alimaniere tio ne estis ebla. Tio grave subtenis la propagandan laboron de EK 15. VI. la svedaj gastoj ekskursis kun lokaj s-anoj al Kunětická Hora.

*Parkán.* Prelego de s-ino Seppik pri Estonio, lando kaj popolo la 30. IX.

*Plan bei Marienbad.* 6. X. malfermo de kurso por komencantoj, 41 p.; instruas s-o Stark el Chodová Planá. Ĉe la malfermo parolis Prof. Baumgärtl pri E. ĝenerale, s-o Donner pri la kongreso en Vieno. Informtabulo en stacidomo kaj propaganda kesto sur la urba placo, bone ekipitaj, spertas meritan atenton.

*Plzeň. — Laboristoj:* 4. IV. kaj 5. IV. solenaj jubileaj jarkunvenoj okaze de la 25 jara ekzisto de la loka „Societo de Laboristaj E-istoj" kaj 15 jara ekzisto de la „Laborista Ligo E-ista". Regula instruado de e. ĉiumerkrede en „Peklo", kie samtempe estas pruntejo de e-libroj. La biblioteko enhavas pli ol 110 binditajn volumojn. SLE havas nun 264 anojn! Novelektita LLE-estraro: prez. J. Pech, Plzeň; vicprez-oj Schweinfurter, Teplice—Šanov, kaj Kopecký, Plzeň; sekr-oj R. Jonák, Plzeň, kaj s-anino F. Richter, Ústí n. L.; kas-oj K. Reiter, Plzeň, kaj Jeschke, Ústí n. L. Ekskursoj kaj renkontiĝoj preskaŭ ĉiudimanĉe, laborkunvenoj kun okcidentbohemaj s-anoj ĉiumonate. 14. VI. propaganda partopreno en la manifestacio de DTJ en Tlučná apud Plzeň. 23. IX. malfermo de kurso por komencantoj en „Peklo", la laborista centro. Gvidas s-o V. Lenk, ĉiumerkrede je la 19a. — *EK* sendis oficialan reprezentanton al la mondkongreso por la paco, s-on Pacanda. — *Germanoj:* 17. II. jarkunveno, kiu reelektis la malnovan labor-komitaton. Reg. kunvenoj en kafejo „Smitka" ĉiun ĵaŭdon posttagmeze.

*Plzeň-Doubravka.* Kurso por laboristoj, malfermita la 25. X.

*Poruba apud Orlová.* 11. X. malfermo de kursoj. 15 komencantojn kaj 10 progresintojn instruas laŭ metodo Benson s-o J. Stankuš, prez. de E-Societo „EMO" en Orlová. La kurso estas planata por 4 monatoj.

*Praha. — EK* raportas sur alia, por si akirita loko, pri sia laboro. — *Verda Stelo:* bonege organizitaj programoj dum regulaj kunvenoj ĉiuĵaŭde en Kafejo Urban: paroladoj kun lumbildoj, bonhumoraĵoj, piknikaj vesperoj, lingva studado k. s. Programo starigita jam nun por ĉiuj kunvenoj ĝis fino de la jaro. — *EK Malá Strana* rearanĝis senpagajn kursojn ĉiuĵaŭdajn en restoracio Dašek, Praha III. — *Katolikoj:* 19. III. jarkunveno de Klubo de Katolikaj E-istoj novelektis prez. s-on K. Trnka, vicprez. s-on Fr. Kudrna, sekr. s-inon M. Trnková. — 2. IV. jarkunveno de Ligo de Katol. E-istoj en ĈSR novelektis prez. f-inon L. Dandová; la ĝisnuna prezid-

into, Dro A. Eltschkner estas elektita honora prezidanto de la Ligo. — Kurson por komenculoj kaj progresintoj gvidas f-ino L. Dandová; antaŭ ĝia malfermo okazis parolado pri la signifo de e. — *Blinduloj:* SOĈNE organizis ekskurson en junio, kiun partoprenis 92 p. — Kursoj por blinduloj en la institutoj: Deyl, komencula kaj perfektiga, gvidas f-ino Jarošová; Hradčany, komencula, gvidas s-o B. Čálek; Klár, knabojn komencantojn kaj progresintojn instruas s-o A. Koudele, knabinojn kom. kaj progres. instruas s-ino Bendová. — *Nusle:* S-o E. Urban invitas s-anojn de Praha kaj iliajn fremdlandajn gastojn rendevuadi en restoracio „Na Tetíně", Praha-Nusle, Palackého tř. 1, kie li estas ĉefkelnero. Ĉiudimanĉe post la 17a koncerto kaj dancado; e. parolata. S-o Urban organizas kurson por kelneroj. — *Skoltoj:* Kurson gvidas f-ino Dandová, 35 p. — Kurson por 20 komencantoj de la Teologia Klubo gvidas s-o O. Máder. — La teknika altlernejo germana malfermis kurson, kiun povas partopreni kiel gastoj ankaŭ nestudentoj, ĉiulunde je la 6—7a en Praha I, Karlova 30, IIa etaĝo, seminarejo dekstre. — En la modela marioneta teatro (palaco de la urba legejo), la ĉefrolulo de unu el la ludoj faras bonhumoran, sed tre utilan propagandon por e. Jozélek de la radiostacio Brno imitis lin. En opereto „Uličnice" ludata kun granda sukceso en teatrejo Velká Opereta, en sceno prezentanta tribunalon, respondas la ĉefaktoro Kraus al demando de juĝisto, ke lia gepatra lingvo estas e.

*Prostějov.* Ĉe-kursoj de s-o H. Seppik bonege sukcesis kaj donis al la loka klubo konsiderindan nombron de novaj anoj. — 25. VI. ĝenerala jarkunveno nov-elektis prez. s-on Fr. Heikenwälder, vicprez. s-on A. Malíček, sekr. f-inon L. Schestáková, kas. s-on St. Jeřábek. Novan perfektigan kurson, komencitan en novembro, gvidas s-o Heikenwälder.

*Příbor.* La printempan kurson finvizitis 25 p. sub gvido de s-o instruisto Sattek. La kursanoj daŭre kunvenadas por perfektiĝi. Fondo de societo preparata. Vendejo „ERO" uzas e-on, benzin-ĉerpejo sur la ĉefa placo faras propagandon per verda stelo kaj surskribo. Ĝia posedanto estas s-ano. Proksime al la stacidomo pendas propaganda afiŝ-kesteto kun ĉiam aktuala materialo. 19. XI. kurso por komencantoj sub la protektorato de la loka kleriga institucio. Gvidas s-o instr. Sattek. Antaŭ ĝia malfermo oni organizis unusemajnan propagandon. Kunvenoj ĉiuĵaŭde en la urba legejo.

*Radvanice.* 4. III. soleno por festi la naskiĝtagon de Masaryk. 26. IV. festaranĝo okaze de mortotago de Zamenhof. 27. IX. malfermo de kurso por 23 komencantoj, organizita de la loka EK „Nova Vivo" sub gvido de s-o J. Hanzelka laŭ metodo Ĉe. 15. XI. Gaja Vespero kaj REL-laborkunveno.

*Reichenberg.* Regulaj kunvenoj de la loka GEL-grupo ĉiun vendredon vespere en „Urstoffhalle" kun bone preparita programo, ekz. paroladoj: 11. IX. La nemorteca besto, 2. X. Pragaj impresoj, 16. X. la 28a Univ. Kongreso. Gajaj aranĝoj, ekz. Anekdota Vespero 18. IX., Surpriza Vespero 23. X., kaj laborkunsidoj ĉiumonate, same perfektigaj ekzercadoj. El la jarraporto de la ĉefkunveno la 31. I. citindas, ke 52 kunvenojn vizitis entute 676 p. La laborkomitato konsistas el prez. s-o Schiller, viceprez. s-o Gahler, sekr. s-o Klufa, kas. s-o Sternschuss, bibl. s-o Hübner. Aŭtune GEL-kursoj. Ankaŭ la urba kleriga institucio aranĝis kursojn sub gvido de supera financkonsilisto Dro Ernst Grubner.

*Röhrsdorf.* 2. VIII. ĝenerala jarkunveno de Ĉs. Laborista Asocio E-ista. Prez. s-o R. Kindermann Varnsdorf.

*Semily.* 4. VIII. publika parolado de f-ino Št. Bálková „Vojaĝo al Afriko" pri la UK 1935.

*Slezská Ostrava.* La E-rondeton gvidas en la jubilea jaro prez. s-o St. Chaloupka kaj sekr. s-o A. Klimošek. — 5. IX. renovigo de regulaj kunvenoj okazantaj ĉiusabate je la 7a en Lidový dům na Kamenci. — 3. X. malfermo de kurso por komencantoj.

*Stonava.* 27. IX. kunsido por decidi pri propaganda laboro farota aŭtune ankaŭ en najbara loko Albrechčice. La loka movado daŭras jam 25 jarojn. 29. XI. jubilea kunveno kaj solenaĵoj.

*Svitavy—Zwittau.* Kurso por germanaj laboristoj.

*Tetschen-Bodenbach.* 12. IV. ĝen. jarkunveno de la Germana E-Ligo. Regulaj kunvenoj de la loka GEL-grupo kun zorge preparitaj programoj ĉiun merkredon alterne en Podmokly, restoracio „Zeughaus" aŭ en Děčín, restoracio „Bürgerstübl".

*Třebíč.* 24.—25. VIII. restadis tie ĉi angla s-anino, Prof-ino V. C. Nixon el Birmingham, delegito de TAGE. Ŝi interesiĝis pri div. infanedukaj aranĝoj kaj ricevis gvidon kaj informojn de la lokaj aŭtoritatoj. — 16. X. malfermo de kurso kun 26 p., kiujn laŭ metodo Kilian instruas s-o A. Schwarzgmeier, faka instruisto. Organizanto de la kurso estas „Komenského střední škola lidová" (mezgrada popollernejo Komenský). La kurso daŭros ĝis fino de junio venonta.

*Uherské Hradiště.* Publikan paroladon de s-o H. Seppik (en la unua periodo de lia agado en nia lando) aŭskultis pli ol 200 p., tiun por lernejo 600—700 lernejinfanoj kaj instruistoj. 5. IV. kurs-fina festo, kiun ĉeestis ankaŭ multaj nee-istoj. Post la Internacia Kongreso de Katolikaj E-istoj vizitis la lokon multnombra ekskursantaro, kiu ĝuis kaj admiris slovakajn melodiojn kaj dancojn. Okazis meso kaj parolado de ĉina pastro, Dro Kao, kio kompreneble vekis multan publikan atenton. EK eldonis belan faldprospekton pri sia urbo kaj ĉirkaŭaĵo inkluzive Hodonín, Luhačovice kaj Zlín. La eldonintaj samideanoj forgesis liveri almenaŭ kelkajn ekzemplerojn al EAĈSR. Novembre propaganda vespero okaze de vizito de s-ino Seppik.

*Ústí n. L. — Aussig a. d. E.* 7. X. malfermo de kurso por germ. laboristoj. 8 komencantojn en „Volkshaus" instruas s-anino F. Richter laŭ metodo Hegewald. — 17. IX. kurso por progresintoj.

*Warnsdorf.* 10. IX. malfermo de 7 monata kurso por 11 germ. laboristoj - komencantoj. Instruas s-ano Schiller laŭ metodo Hegewald. Krome okazas perfektigaj lecionoj por 12 progresintoj.

*Vodňany.* 14. X. malfermo de konversacia kurso.

*Vratislavice—Maffersdorf.* 21. VI. ĉelkunveno de Distrikta Asocio Reichenberg (GEL). 17 p. el 5 lokoj. Krom ĝeneralaj aferoj oni faris decidojn koncerne eldonon de turistaj prospektoj pri Montaro de Jizera en e. Bone organizitaj paroladoj, ekskursoj kaj kursoj.

*Zlaté Moravce.* 5. X. malfermiĝis aŭtuna kurso. Instruas s-o Felt 10 progresintojn laŭ Kilian, kaj f-ino M. Feldmannová 9 komencantojn Ĉe-metode (ambaŭ instr. estas ŝtate ekzamenitaj). La kurso daŭros 3 monatojn.

*Znaim.* Kursojn organizitajn de EAĈSR, komenculan kaj perfektigan, gvidas s-o Ph. Mr. Fr. Höfert. 7. VIII. vizitis la urbon multnombra ekskursantaro de la internacia kongr. de katolikaj e-istoj, kiu aranĝis laborkunsidon tie ĉi kaj rigardis la valbarilon apud Vranov. — Oktobre malfermiĝis tri kursoj: komencula de EAĈSR, 9 p. laŭ Kilian instruas s-o Pollak; perfektiga de la katolika grupo, 10 p. instruas s-oj Mr. Fr. Höfert kaj Hochan; konversacia de la germana rondeto, 10 p. gvidas s-oj Czerweny kaj Brunner, laŭ div. lernolibroj.

*Železný Brod.* 1. V. laborkunveno en hotelo „Véle" kaj ekskurso al Navarov de nordbohemaj e-istoj. Partoprenis 90 p. el 32 lokoj. Referaĵoj de delegitoj, diskuto, propaganda marŝo tra la urbo, komuna tagmanĝo, ĉe favora vetero kaj multa entuziasmo.

---

## Esperantista vivo.

Pastro *Jan Filip*, aŭtoro de la Granda e-ĉeĥa vortaro, celebris sian unuan meson la 6-an de julio. Li akceptu niajn plej amikajn salutojn.

En julio edziĝis nia kunlaboranto s-ro *Josef Vítek*, ŝtata burĝlerneja instruisto en Tisovec kun f-ino *Magda Malá*. Elkoran gratulon!

Mortis la 17-an de junio *P. Karel Zouhar*, konsistoria konsilanto, esperantisto depost 1904.

Nia membro s-ro *Abraham Davidovič* en Chust perdis sian 2-jaran filineton *Ibolya*, kiu samtempe kun sia lingvo gepatra lernis esperanton.

La 19-an de septembro mortis s-ro *František Hochman*, Olomouc, en sia 56-a jaro, membro de tiea klubo depost la jaro 1908.

Ankaŭ en septembro mortis s-ro *Rudolf Vejnar*, bibliotekisto de la Esperantista klubo en Hradec Král.

La familioj de niaj mortintaj amikoj akceptu nian sinceran kondolencon.

La 13-an de novembro mortis en Lenešice s-ro *Staněk*, patro de niaj komitatanoj s-roj František kaj Miloslav Staněk. Sinceran kondolencon!

## Radio.

Brno (samtempe Praha I. kaj Mor. Ostrava):

15. V. František Langer, Grandhotelo Nevada, trad. Fr. Heikenwälder.
27. V. Dro Jos. Šusta, finaj vortoj al la ciklo Ĉeĥoslovakio laboranta. Informoj de la XVIII-a Kongreso de katol. esperantistoj en Brno.
3. VI. Nia Estonta, radiofilma komedio de J. V. Šamla.
7. X. D. Chalupa, La frato de Prometheus, biografia ludo pri T. A. Edison. Trad. Th. Kilian.
4. XI. Esperanta horeto: Zd. Fibich, Mia knabineto. M. Braun, Okazintaĵo en Magnuŝov. Leterkesto.

Moravská Ostrava:

19. V. Dr. J. Říhová, Vizitu la ĉeĥoslovakajn banlokojn.
26. V. E. Tengler, La lernejaj aferoj en regiono de Těšín antaŭ okdek jaroj.
2. VI. O. Gadula, Iom da legendoj el la ĉeĥa historio.
9. VI. J. Šulc, Regiono de Opava kaj ĝia popolo.
23. VI. Inĝ. L. Krajc, Vivo de naciaj minoritoj en ĈSR.
30. VI. A. Zbavitel, Moravio, ponto inter ĉeĥoj kaj slovakoj.
29. IX. Dr. J. V. Šimák, Bohemio dum regado de Luksemburga dinastio.
6. X. A. Zbavitel, Slovakaj pioniroj de la ĉeĥoslovaka unueco.
13. X. J. Ulman, Pri la ĉeĥoslovakaj fervojoj.
20. X. E. Dočkalová, La ĉeĥosl. knabino kaj sporto.
3. XI. A. Říhová, Nia socia vivo iam kaj nuntempe.
10. XI. Dr. O. Odložilík, La husanismo.
17. XI. K. Kapek, La ĉeĥoslovaka muziko inspiras la mondon.
24. XI. Dr. B. Pešek, Skianto en Slovakio.

Esperantistoj aĉetas bonŝancajn **lotbiletojn de ĉs. klasloterio** sole ĉe nia samideano **Josef Hromádko, Lom u Mostu 56.**

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo EAĈSR afrankite por la notita sumo.

*G. F. Wales, Progresado kaj la pasinteco.* Trad. W. Bailley. Eldonis The Esperanto Publishing Co. Ltd., London. 152 pĝ 13x22 cm en tolbindaĵo. Prezo Kč 35·—. Instrua verketo, utila por ĉiu, kiu volas al si havigi aŭ rememorigi ĝeneralan scion pri la evoluo de la homaro. La aŭtoro per spritaj komparoj ripete pruvas, ke ĵurilate nemulto ŝanĝiĝis depost la epokoj prabarbaraj. Lingvo bona, same aranĝo.

*L. E. Thomson, Multe pli da amo.* Komedio en tri aktoj. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 32 pĝ 19x13 cm. Prezo Kč 3·50. Bonhumora teatraĵeto, lokita de aŭstralia aŭtoro en la Cseh-Instituton.

*M. Biernacki, La verko de Chopin.* Trad. kaj biografion verkis dro Jan Medrkiewicz. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 28 pĝ 19x13 cm. Prezo Kč 4·—. Leginda kajero pri la granda polo kaj lia verko.

*Poŝtkartoj kun bildo de Baghy kaj de Kalocsay* (du diversaj) laŭ desegno de St. Bartha. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 1 ekz. Kč 1·50, 10 ekz. Kč 11·50.

*100 pikantaj panŝmiraĵoj.* Laŭ dro M. Topolansky trad. dro H. Sirk. Eldonis Ruhm-Verlag, Wien VII., Museumstr. 3. 42 pĝ 12x15 cm, broŝ. Prezo Kč 6·50. Kiel ŝmiri panon laŭ 100 diversaj manieroj, estas la temo de la verketo. Ĝi estos interesa por multaj pro praktika uzebleco kaj ankaŭ laŭ lingva vidpunkto. Dro Sirk lerte nin instruas paroli pri tiuj ĉi aferoj ĉiutagaj, sed de ni tamen malofte priparolataj.

*Lakshmiswar Sinha, Hindo rigardas Svedlandon.* Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 200 pĝ 14x21 cm, 128 ilustraĵoj. Prezo Kč 29·— broŝ., Kč 35·— bind. La aŭtoro el la instituto de Rabindranath Tagore vivis plurajn jarojn en Svedlando. Pruvo, ke li vojaĝis tie kun malfermitaj okuloj, estas tiu ĉi eksterordinara libro. Kiel alilandano, sed tamen ĉie helpata de enlandaj esperantistoj, li pli facile ol svedoj trovis, kio estas interesa kaj rakontinda pri la lando kaj popolo. Li prezentas abundajn informojn en lingvo senriproĉa. Pri libro de niaj stockholmaj amikoj ni ne bezonas akcenti, ke ĝia eksteraĵo estas unuaranga.

*Jan Wolski, Ĉu ĝi estas nur fabelo?* El pola lingvo trad. R. Dabrowski. Esp. Eldon-Kooperativo, Warszawa. 158 pĝ 13x19 cm kun ilustraĵoj kaj muziknotoj. Ĉarma rakonto por junularo instruanta pri la beno de kooperativismo. Infanoj gvidataj de instruisto fondas kvazaŭ lude kaj preskaŭ sen rimedoj kooperativon, kiu atingas grandajn sukcesojn. Esperanto estas en la amuza kaj instrua verko kelkfoje aludita. Prezo Kč 17·50.

*Jubileumboek 1911—1936* de Federacio de nederlandaj laboristoj esperantistaj estas 160-paĝa libro, kiu plenigos per ĝojo koron de ĉiu esperanto-amiko. Estas raporto pri la bona dudekkvinjara laboro de la nomita organizo, havinta ĉe fino de la pasinta jaro 3960 membrojn. Jen esperantistoj, kiuj komprenis la signifon de unuigita laboro!

*Libervola civila helpservo internacia.* Eld. AIH, Bern. 16 pĝ kaj 4 pĝ da ilustr. 14x21 cm. Bela broŝuro pri la nobla celado kaj farita granda laboro de la Asocio por internacia helpservo. Enkondukas ĝin brila artikolo „Fosilo anstataŭ pafilo" de Edmond Privat. Ricevebla por 1 respondkup. de Julio Gilliard, rue des Granges, Neuveville J. B., Svislando.

*UŜE-EĤO* (Eĥo de Unuigitaj ŝtatoj eŭropaj). Organo de Eŭropanismo. Redakcio kaj administracio Timisoara I., Str. Alexandri 7, Rumanio. Aperas dumonate. (4 paĝoj 31x48 cm.) Abonprezo por 6 numeroj 1·50 sv. fr. — Ĝi pledas por kreo de unuigitaj ŝtatoj eŭropaj, kiuj defendus komunajn rajtojn de Eŭropo kontraŭ la ceteraj mondpartoj. Esperanto estus oficiala lingvo de tiu ĉi federacia (?) ŝtato. La gazeto opinias, ke tiu movado povas fariĝi grava politika aganto en Eŭropo. Enestas en la gazeto multaj kontraŭ-judaj kaj kontraŭ-bolŝevismaj atakoj kaj laŭdoj de vidmanieroj propagandataj oficiale en nuntempa Germanujo. Ĝenerale la artikoloj ne pruvas, ke la verkintoj estas sufiĉe funde informitaj pri la komplikeco de problemoj, pri kiuj ili volas raporti kaj kiujn ili volas solvi. Redaktoro estas Josef Zauner. En septembro 1936 aperis 31-a numero.

*J. Šupichová, Slovníček cizích slov.* Eld. Ant. Dědourek, Třebechovice p. O. 44 pĝ 11x15 cm. Prezo Kč 3·20. La konata verkistino preparis por junularo vere salutindan helpilon, cetere tre taŭgan ankaŭ por plenkreskuloj. Al traduko aŭ klarigo estas aldonitaj ofte instigaj vortoj, sub „Esperanto" konsilo lerni ĝin.

*Esperanta kalendaro.* Eld. en kunlaboro kun Cseh-Instituto J. Philip Kruseman, S'Gravenhage, Nassauplein 1 B. 27 folioj 18x28 cm, ĉiu kun interesa bildo el la esperanta movado kaj kun klariga teksto. Prezo Kč 24·—. Plej taŭga ornamo de esperantista skribotablo, ĉarma donaco novjara.

*Josef Zauner,* eldonanto de UŜE-EĤO: *Genève aŭ Eŭropa Centro?* Timisoara (Rumanio). 32 paĝoj 15x11 cm. Prezo sv. fr. —·30. La aŭtoro proponas krei Centron, kie estus centrigitaj precipe la informaj institucioj por la tuta Eŭropo. Tiamaniere ĉiu eŭropano ricevus sian poŝton dum 24 horoj. Ĝi kuŝus, kie tranĉas sin linioj kunligantaj London-Ankara, Moskva-Madrid, Oslo-Roma. Ĉi estas proksime de Regensburg.

*Verkoj de FeZ.* Plena verkaro de dro Felikso Zamenhof. Redaktis Ed. Wiesenfeld. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 272 pĝ 23x15 cm. Dukolore presita sur glata papero. Prezo broŝ. Kč 31·—, bind. Kč 35·—, lukse bind. Kč 45·—. Esperantistoj certe salutos tiun ĉi zorgan kolekton de ĉio, kion verkis la frato de la Majstro.

**Oni vendos la verkon**

**Výbor z krásné prózy československé**

redaktitan de K. Sezima, eldonitan de Ŝtata eldonejo. La verko havas dek dikajn volumojn. Ĝi estas kompleta, nedifektita, nebindita. Originala prezo estas 300 Kč. Ni vendos ĝin por duono. La demandojn al nia sekretariejo Esperanto-Asocio en ČSR. en Praha XIX. Ural. n. 447.

Ankaŭ ni vendos unuopajn kajerojn de la kolekto „1000 nejkrásnějších novel" po Kč 1·70.

**Internacia korespondado:**

*Takezo Tokahaŝi*, Hakoiwa, **Kaĵi**, *Kitakaubara*, Niigata-ken, Japanujo — dez. intŝ. filmajn gazetojn, PI, PM.

*Miĥaelo A. Lulic*, Hairdresser, 10 Water Str., *Whangarei*, N. Auck., New Zealand -- 32-jara fraŭlo.

*Demetro Palomino*, *Llapa*, Hualgayoc, Dpto Cajamarca, Peru — dez. koresp. pri kulturaj kaj pedagogiaj temoj.

S-rino *B. Meredith*, Shaftmoor Lane 450, Hall Green, *Birmingham 11*, Anglujo — serĉas adresojn de ĉeĥoslovakaj esperantistinoj, kiuj dez. korespondi kun ŝiaj lernantinoj.

S-ro *Gwynne Humpreys*, 99, Kingfield road, *Liverpool 9*, Anglujo, dez. koresp. kaj intŝ. PM, PI.

*Papervendejo en Znojmo,*
*situiĝanta najbare de kelkaj lernejoj, tre favore vendota. Seriozaj interesiĝantoj skribu al s-ro Mr. Fr. Höfert, Znojmo, Otakarova 2.*

## *Movado.*

**XXIX. Universala Kongreso de Esperanto** en Varsovio 7.—15. aŭgusto. La LKK (Warszawa, Chmielna 26) jam eklaboris, informas pri la brila programo preparata kaj dissendas aliĝilojn. Kotizo ĝis 31. I. 1937 Kč 130·—, por familiano Kč 82·—, por gejunuloj malpli ol 18-jaraj kaj por Helpkongresanoj Kč 54·—, ĝis 30. IV. 1937 Kč 150·—, Kč 93·—, Kč 62·—, ĝis 30. VI. 1937 Kč 166·—, Kč 104·—, Kč 70·—, depost 1. VII. 1937 plenaj kotizoj Kč 186·—, Kč 116·—, Kč 78·—. Por ŝpari kaj por faciligi la laboron de LKK aliĝu rapide! Preparataj: komuna vojaĝo el Ĉeĥoslovakio kaj antaŭkongreso en Praha.

**Helpu la movadon en Aŭstralio!** Du larĝvidaj senatoroj de aŭstralia parlamento pledas publike por komuna lingvo kaj volas peti la britan registaron, ke ĝi kunvoku internacian konferencon, kiu traktu pri tiu afero. Por ilin informi pri la jama disvastiĝo de esperanto, skribu al ili almenaŭ simplan gratulan poŝtkarton aŭ leteron. Adreso: Senator Abott, Parliament House, Canberra, Aŭstralio kaj Senator Duncan-Hughes, Parliament House, Canberra, Aŭstralio.

**Esperanta konkurso en Kimrujo.** „National Eisteddfod of Wales“ — tre grava literatura kaj muzika festo — enmetis en la programon por la venonta jaro (1937) esperantan konkurson. Por la plej inda traktado pri „Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj“ oni donos premion de 5 f. (100 ŝilingoj). Ĉiu verkaĵo devas esti skribita sur unu flanko de la papero. Uzu paperon sufiĉe grandan (ĉirkaŭ 30x20 cm) kaj kunligu la foliojn. Ĉiu verkaĵo afrankita kaj registrita, devas esti ĉe la sekretario (s-ro J. Rhys Lewis, Eisteddfod Office, Machynlleth, Mont, Wales, Granda Britujo) inter 22-a aprilo kaj 1-a majo 1937. Ĉiu konkursanto devas subskribi sian verkaĵon per pseŭdonimo kaj sendi sian nomon kaj adreson en sigelita koverto sur kiu montriĝas la nomo kaj numero de la konkurso, nome „Esperanta Traktato, n-o 30“, kune kun la pseŭdonimo de la konkursanto.

## *Informoj.*

**Tradukoj el esperanto.** Samideanoj disponantaj pri iom da libera tempo kaj sciantaj absolute senerare traduki el esperanto en ĉeĥan lingvon estas sincere invitataj al kunlaboro en la komitato de EAĈSR. Ni bezonas prestaŭĝajn tradukojn laŭeble maŝineskribitajn. Helpopretaj samideanoj postulu detalojn de EAĈSR.

**Afiŝoj kaj glumarkoj,** frapa desegno de bona artisto. Afiŝoj kun libera spaco por informo pri kurso, kunveno ktp. 1) sur afiŝa papero 63x95 cm Kč 2·30 unu ekz. afrankite, 2) sur kartono 21x29 cm por montraj fenestroj magazenaj, por kafejoj, razejoj, kuracistaj atendejoj, kie ili bone kaj daŭre informos pri sidejo de loka grupo, de la delegito — Kč 1·80 unu ekz. afrankite. Ĉe mendo de 30 ekz. sume de ambaŭ specoj 25% rabato. Glumarkoj kun sama desegno 50 ekz. Kč 2·50 afrankite.

**Jeden jazyk pro celý svět,** la bonega ĉeĥa propagandilo sur 8 paĝoj, estas denove havebla. Ĵus aperis nova eldono. Ĉiu aktiva samideano mendu kaj disvastigu, ĉiu grupo havu provizon da ili kaj disdonu al personoj varbindaj. 100 ekz. 20 Kč, 10 ekz. 2·40 Kč afrankite. Sampreze ni povas liveri

**Jeden jazyk pre celý svet,** slovaklingvan eldonon de tiu ĉi flugfolio.

**Všem přátelům,** kvarpaĝa varbilo, klarigas per instigaj vortoj la signifon de organizo. 100 ekz. 10 Kč, 10 ekz. 1·20 Kč afrankite.

**An alle Freunde,** la sama varbilo en lingvo germana, samkoste liverebla.

**Ĉeĥa ŝlosilo,** nova reviziita, unua normigita eldono, 32 pĝ, sur unuaranga papero, estis ĵus finpresita. Prezo: 1 ekz. 1·20 Kč, 10 ekz. 11 Kč, 50 ekz. 45 Kč, 100 ekz. 80 Kč afrankite. Aĉetu kaj disvastigu tiun ĉi internacie faman broŝureton.

**Malnovaj gazetoj vendeblaj** Esperanto 1923—1935, Progreso 1918—1935, Teritoria Tribuno 1928—1929, Esperantský zpravodaj 1920—1923. Interesiĝantoj skribu prezojn, kiun ili volas pagi, al Libroservo de EAĈSR.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 54.

# *Raporto pri agado de Esperanto-Asocio en ČSR en 1936.*

(Prezentita al regula kongreso en Moravská Ostrava 28. II. 1937.)

1. **Konsisto de la komitato.** La komitato, elektita en nia fonda kuveno dum la sesa ĉeĥoslovaka kongreso esperantista en Brno la 28. IX. 1935, komencis funkcii nur post la lasta ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, kiu transdonis al ni ĉiun siajn havaĵojn, laborantojn kaj tradicion. Sed la komitato estas pli ampleksa ankaŭ laŭ kultura vidmaniero, ĉar enestas en ĝi reprezentantoj de nialandaj germanoj. La komitato dividis la funkciojn en la unua sia kunveno en Praha la 16-an de februaro 1936. La unua komitata kunveno kreis ankaŭ pli grandan nombron de komisionoj kaj trovis rimarkindan nombron de novaj estroj komisionaj. La listo rezultinta estas sur p. 21. Kvankam la komitatanoj loĝas en tre diversaj lokoj de la respubliko, estis ilia kunlaboro tre bona. La divido de la funkcioj estis sen ŝanĝo dum la tuta jaro.

2. **Komitataj kunvenoj** estis 7, ĉiuj en Praha. Unu estis prezidita de prez. Kamaryt, unu de vicprezidanto Mr Höfert, la ceteraj de vicprez. Ginz. Al ĉiuj kunvenoj venis pluraj informaj kaj instigaj leteroj de la komitatanoj ekster-Prahaj. Kopioj de la protokoloj ciklostilitaj estis sendataj regule al ĉiuj komitatanoj. Protokolis en ĉiuj kunvenoj ĝen. sekr. ark. Frant. Staněk, ciklostiladis kaj dissendadis la protokolojn Mir. Staněk.

3. **Regionaj kunvenoj.** Niaj reprezentantoj ĉeestis kaj oficiale parolis en ĉiuj iom gravaj kunvenoj esperantistaj. Dum inaŭgura festo de Memorŝtono en Lichnov parolis en nia nomo Ing. L. Krajc, en regiona kunveno en L. Bělohrad K. Koutek, en E-ista rendevuo en Hradec Králové vicprez. Ginz, ĉe Kursfina festo en Dubí V. Echtner, ĉe regiona kunveno en Nové Zámky (Charvát), ĉe ĝenerala kunveno de Regiona Ligo Esperantista en Č. Těšín kasisto Friedrich.

4. **Administrado.** Ni transprenis de ĈAE sistemon de komisioj elprovitan dum pluraj jaroj kaj ni provis pligrandigi nombron de komisionoj kaj eĉ doni al la komisiona estro du-tri kunlaborantojn. Tiu metodo bezonos ankoraŭ tempon por pliperfektiĝi, ke la estro de komisiono ne estu unusola ĝia laboranto. En kelkaj fakoj ĝi jam efektive okazas tiel. La listo de la komisionoj estas sur p. 21. Al komisionoj tie enskribitaj aliĝis dum la jaro komisiono skolta kun Fr. Buhr, kiel estro. Ekster la komisionoj daŭrigis Fr. Slavík sian gravan helpon al nia organizo kaj al ĉiuj nianlandaj esperantistoj kiel estro kaj ĉeflaboranto de la Libro-Servo.

Krom tio li ankaŭ dum tiu ĉi jaro estis nia honora oficejestro, kiu akceptadis korespondaĵojn, respondadis multajn el ili kaj la ceterajn dissendadis al kompetentaj funkciuloj. Krome li dissendadis la Bultenon. Li meritas dankon tute apartan pro sia sindono al nia organizo. La gvida centro de asociaj laboroj estis ĉe vicprezidanto Ginz. Ni depost 1-a de februaro ne plu havis oficiston, tial estis vicprezidanto Ginz ekstreme okupita. Unu nia skribmaŝino estas ĉe prezidanto, la dua, ĉe la gvidanto de membraradministrado O. Štěch, multobliga aparato ĉe M. Staněk, kiu laboras per ĝi. Ni rigardas tian staton provizora kaj ni serĉas taŭgan ejon kaj lertan oficiston.

Por oficeja fondaĵo ni faris dum la jaro neniun propagandon. Tamen venis kotizoj de:

| | | |
|---|---|---|
| Ing. A. Fotul, Rachov . . . . . . . . . | Kč | 10·— |
| Josef Kosina, Praha VII. . . . . . . . . | „ | 10·— |
| J. David, Liberec . . . . . . . . . . . | „ | 5·— |
| Esperanto-Verein, Weipert . . . . . . . | „ | 10·— |
| W. Mauksch, Lubica . . . . . . . . . . | „ | 25·— |
| Kun sumo de 1. I. 1936 . . . . . . . . | „ | 2613·30 |
| sumiĝas oficeja fondaĵo 31. XII. 1936 . . | Kč | 2673·30 |

La donacintoj akceptu nian sinceran dankon. Tiu ĉi listo estas la 5-a.

Al fondaĵo ekzamena venis dum la jaro neniu donaco.

Nove ni kreis fondaĵon de Bulteno. Vidu pri ĝi paĝon 30!

Sumo de forsenditaj leteroj kaj poŝtaĵoj estis 3639, de presaĵoj 1578. En la antaŭa jaro estis interrespondaj nombroj 2221 kaj 3061. En tiujaraj ciferoj ne estas enkalkulitaj ciferoj de forsenditaj cirkuleroj kaj kompreneble ankaŭ ne la ekzempleroj de Bulteno.

5. **Ekspozicia materialo** (komisionestro E. Beran). La stato de kolekto restis sen grava ŝanĝo. La materialo estas jam ordigita laŭ enhavo kaj laŭ praktika uzebleco. Sed taŭga bretŝranko, pri kies donaco ni petis lastan jaron, mankas ĝis nun daŭre. La granda parto de materialo estis tiun jaron pruntita Brnon, kie ĝi estis uzita por ekspozicio dum la katolika kongreso, pri kiu ni raportis sur p. 39. Krome estis la materialo pruntita en urbon Melč. La albumo de EAĈSR estas daŭrigata; estis

enmetitaj pluraj fotografaĵoj kolektiĝintaj ĉe la funkciuloj dum la jaro. Ni rekomendas al samideanoj neniam forgesi sendi ĉiun foton al nia komisionestro, por ke la rememoro pri ĉiuj niaj kunlaborantoj estu konservita.

6. **Informado pri esperantistaj entreprenoj.** Nia daŭra klarigado havis sukceson tiel, ke nun ni jam ricevas informojn preskaŭ pri ĉiuj entreprenoj kaj ni sukcese klopodas, ke niaj Kroniko kaj Lokaj informoj en la Bulteno estu kompletaj. Ni donas ankaŭ tiun jaron nomaron de lokoj, pri kiuj ni povis raporti dum 1936: Asch, Bakov n. J., Bardejov, Bohumín, Bor, Böhm. Leipa, Bratislava, Brno, Břeclav, Březová, Cvikov, Č. Kamenice, Č. Třebová, Č. Budějovice, Č. Těšín, Darkov, Děčín, Dobrovice, Dolní Bousov, Dolní Marklovice, Doubrava, Drahowitz, Dubí u Kl., Falkenau, Frýdek, Frýštát, Hor. Litvínov, Hradec Králové, Hluk, Hrušová u C. n. L., Gablonz a. d. N., Grünwald, Jablonecké Paseky, Jägerndorf, Jaroměř, Jičín, Jihlava, Kladno, Kolín, Komotau, Košice, Kratzau, Kukleny, Kutná Hora, L. Bělohrad, L. Štramberk, Levice, Lichnov u Fr., Litice, Litoměřice, Lubná, Melč, Michalovce, Milevsko, Ml. Boleslav, Mnichovo Hradiště, Mor. Ostrava, Nové Zámky, Nový Bohumín, Nymburk, Olomouc, Orlová, Pardubice, Parkán, Plan b. M., Plzeň, Poruba n. O., Praha, Prešov, Příbor, Prostějov, Radvanice, Reichenberg, Röhrsdorf, Rychnov, Semily, Smržonka, Slezská Ostrava, Spišská Nová Ves, Stonava, Svitavy, St. Joachimstal, Teplice-Šanov, Třebíč, Třinec, Turnov, Uh. Hradiště, Ústí n. L. (Aussig), Vítkovice, Vodňany, Vratislavice, Vrútky, Warnsdorf, Zlaté Moravce, Znaim, Železný Brod, Žilina. Sume 96 lokoj. Antaŭ jaro same 96 lokoj. Hodiaŭ ni atentigas pri tiu ĉi sufiĉe alta nombro por instigi komparon kun listo de niaj lokaj grupoj.

(Daŭrigo en 2-a n-ro de Bulteno.)

## Financa raporto pri 1936.

I. administra jaro de EAĈSR.

| | | Aktivoj Kč | h | Pasivoj Kč | h |
|---|---|---|---|---|---|
| **Ferma bilanco:** | | | | | |
| 1. Mono en la kaso | | 38 | 80 | | |
| 2. Mono en la poŝta ŝparkaso | | 1187 | 80 | | |
| 3. Mono en Občanská záložna en Košice | | 3613 | 60 | | |
| 4. Inventaro (post depreno de la amortizo) | | 460 | — | | |
| 5. Diversaj entreprenoj | | 13181 | 55 | | |
| 6. Diversaj debitoroj kaj kreditoroj | | 3283 | 05 | 2459 | 65 |
| 7. Fondaĵo ekzamena | Kč 488·60 | | | | |
| „ oficeja | „ 2.673·30 | | | 3161 | 90 |
| 8. Transitivoj | | 114 | 30 | | |
| 9. Ŝuldo al UEA | | | | 4251 | 90 |
| 10. Ŝuldo al IEL | | | | 237 | — |
| 11. Asocia kapitalo la 1. I. 1936 | Kč 10.140·25 | | | | |
| Bilanca gajno | „ 1.628·40 | | | 11768 | 65 |
| | | 21879 | 10 | 21879 | 10 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | | 11492 | — |
| 2. Procentaĵo pro enkasigado de UEA-kotizoj | | | | 1215 | 30 |
| 3. Diversaj entreprenoj | | | | 1744 | 40 |
| 4. Elspezoj de administrado | | 5913 | 25 | | |
| 5. Elspezoj de propagando | | 6022 | 45 | | |
| 6. Diversaj elspezoj | | 127 | 60 | | |
| 7. Amortizo de inventaro | | 760 | — | | |
| 8. Bilanca gajno | | 1628 | 40 | | |
| | | 14451 | 70 | 14451 | 70 |

En Košice la 31-an de decembro 1936. JOSEF FRIEDRICH, kasisto.